Message du : 22/10/2012 12:08 De : "Anna Lowenstein " <anna.lowenstein@esperanto.org>
A : "Yves Nicolas" <ivnicolas@sfr.fr> Copie à : renato.corsetti@esperanto.org
Sujet : Finfine - raporto pri nia rondiro

Kara Yves,

Multajn dankojn pro la raporto, kiun vi sendis al ni. Pardonu, ke ni mem bezonis tiom da tempo por skribi al vi, sed post nia reveno ni ambaŭ trovis amason da nerespondītaj mesaĝoj por trakti. Tamen, ni jam skribis al ĉiuj gastigantoj aparte por danki ilin.

Ĉar vi jam ricevis raportojn de ĉiuj grupoj pri la enhavo de niaj prelegoj ktp. mi ne ripetos tion. Mi supozas, ke por vi estus pli utile scii, ĉu ni estis kontentaj pri la gastigado, la turismaj aranĝoj, kaj la organizado ĝenerale. Do, jen niaj pensoj pri la afero.

**Gastigado**: La gastigado ĉie estas tre bona. Aparte komfortaj estas la kondiĉoj ĉe Renée en La Ciotat, Jean Louis kaj Eliane en Bourg-en-Bresse, kaj Serge kaj Monique en Montpellier, ĉar ĉe tiuj ni praktike havis propran apartamenteton. Sed ankaŭ la aliaj estis bonaj kaj komfortaj.

**Manĝoj:** Oni tre bone manĝigis nin ĉie. Plurfoje la tuta grupo kunmanĝis en restoracio, aŭ ĉiuj kunportis ion por krei komunan bufedon. Tiuj komunaj manĝoj estis bonega afero ne nur por ni, sed por la grupanoj ĝenerale, ĉar ili kreas bonan etoson kaj senton de kunlaboremo inter la grupanoj.

**Turismo**: Ĉie oni portis nin al interesaj turismaj vidindaĵoj. Aparte interesis min la vizitoj al Chartreuse (kaj al Gap ĝenerale, kiu estas en belega regiono), la preĝejo kaj monaĥejo en Bourg-en-Bresse, Pont du Gard, la roma amfiteatro kaj belega muzeo en Lyon... Krome estis urbaj vizitoj en Grenoble, Lyon, Marseille, kaj verŝajne pluraj aliaj, kiujn mi nun forgesis.

**La kunvenoj:** Kiel vi jam vidis, la homoj maksimume ekspluatis nian ĉeeston por prelegoj ne nur en la grupoj, sed ankaŭ en diversaj publikaj ejoj, kaj ni ankaŭ parolis en pluraj lernejoj kune kun Monique en Gap kaj Grenoble. En ĉiuj lokoj la grupanoj renkontiĝis ĉiutage dum pluraj sinsekvaj tagoj por ĉeesti la diversajn aranĝojn. Mi demandis min, ĉu tio ne tro streĉos ilian paciencon, sed ili ŝajnis entuziasmaj.

**Financaj aranĝoj**: Se vi faros similan aranĝon estonte (t.e. kun homoj, kiuj vojaĝas per propra aŭtomobilo), estus preferinde peti la grupojn sendi la monon al vi, kaj ke poste vi transpagu la sumon al ties UEA-konto. Doni la monon surloke estas potenciale embarasa aranĝo.

**Niaj ĝeneralaj sentoj pri la afero**: Mi pensis antaŭ ol ekvojaĝi, ke la du semajnoj estos ferio. Tute male, poste ni preskaŭ bezonis ferion por rekapti niajn fortojn post la ferio! Kvankam ni tre ŝatis la gastigadon kaj la turismajn aranĝojn, estis eĉ tro da bonvolemaj turismaj aranĝoj ktp. Ni estus preferintaj havi iom pli da libera tempo por ni mem, kaj por kontroli nian repoŝton dum la vojaĝo. Do, ni ne sentas grandan haston por ripeti la aranĝon en norda Francujo. Eble post du-tri jaroj...

Dirinte tion, tamen, la ideo estas bonega, kaj mi vidas, kiom ĝi kontribuas al la kohereco de la grupoj kaj ankaŭ al kunlaborado inter la grupoj. Ĝi donas al ili utilan agadon, celon, kialon por renkontiĝi plurajn fojojn kaj ankaŭ reenplekti homojn, kiuj normale ne aktivas. Sendube ĝi ankaŭ kontribuas al la ĝenerala lingvonivelo de la grupanoj, kiuj estas devigataj paroli en Esperanto kun la gastoj.

Tuj post mia reveno mi prezentis nian sperton ĉe la roma grupo, kaj proponis, ke estus interese fari ion similan en Italujo. Sed mankas la plej grava homo: la organizanto. Por aranĝi kunlaboradon inter tiom da grupoj, kontakti ĉiujn, pretigi la vojplanon, ktp. oni bezonas bonegan kaj laboreman organizanton, kaj tian homon la francoj evidente trovis! Mi ne scias, kiu pretus fari tian laboron en Italujo. Iu sugestis, ke kiam vi venontan fojon organizos rondvojaĝon en Francujo, se vi informus nin, eble la homo eventuale pretus daŭrigi almenaŭ al la nord-italaj grupoj. Kion vi pensas pri tiu ideo?

Kore,

Anna kaj Renato

---------------------------------------------------------------------

Anna Lowenstein
Via del Castello 1
00036 Palestrina
Italujo
Tel: 00-39-06 9575 713
anna.lowenstein@esperanto.org